

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio. Vi aŭdas prelegon de Claude Gacond pri la neperforta revolucio en Sicilio.

Lastjare, inter la 7-a kaj 16-a de septembro, vi eble aŭdis paroli pri la fasto de Danilo Dolĉi, la gvidanto de la revolucio en Sicilio. Danilo Dolĉi fastis por rememorigi al la italia registaro ĝian promeson konstrui baraĵon sur la rivero Ĵato en la Palermo provinco.

Jam en la jaro 1927 oni petis la ministerion pri publika laboro entrepreni la konstruon de tiu baraĵo. Sed ĝis 1955 nenio efektiviĝis. Tiam la Instituto por agrara reformo en Sicilio redaktis novan raporton, kiu bedaŭrinde restis traktota ĝis 1959 en teknika oficejo. En 1960 Danilo Dolĉi aranĝis popolan manifestacion, sed sen granda rezultato.

Tiu konstruota baraĵo kapablos reteni 60 milionoj da kubaj metroj da akvo kun jar-disponebleco de 45 miliardoj da kubaj metroj. Tio permesos irigacii proksimume 11000 hektarojn de hodiaŭ dezerta regiono. Ekonomie tio signifas, ke la jara enspezo de tiu provinco pliiĝos je 4 miliardoj da liroj. 4000 novaj terkulturistaj laboreblecoj kreiĝos. Ĉu ne estas gravaĵo en regiono, kie senlaboreco estas taga dramo ? En Sicilio estas 1 miliono da senlaboruloj por kvin milionoj da enloĝantoj.

Sed kial la laboro ne povis efektiviĝi ? Jen kio okazis : tiu projekto ne plaĉis al la organizo nomata Mafia, kaj neniuj kuraĝis publike kontraŭstari tiun sekretan societon, kiu ekde 1820 regas en Sicilio per tiranecaj perfortaj dekretoj. La komercistoj, la kamparanoj kaj la etbienposedantoj timas la venĝon de la Mafia, kiu dungas murdistojn kiel sekretajn soldatojn. Kaj la registara polico ankaŭ timas la Mafia-movadon. Tiel la grandbienposedantoj povas pere de tiu Mafia pluigi feodalan socian strukturon. Pro la minacoj de la Mafia la mezurado de la subakvota regiono nur povis efektiviĝi per helikopteroj. Tio nebligis precizan laboron, kaj pro tio naskiĝis plendoj de iuj bienposedantoj. Aliaj bienposedantoj, kiuj gajnegis vendante multekoste akvon dum la malseka sezono, rifuzis vendi sian bienon je la ofertita prezo. Ili timigis la kamparanojn, kiuj mortus, se ili ne povus aĉeti tiun akvon dum la somero, kaj tiuj kamparanoj subskribis peticion kontraŭ la baraĵo ! Roma entrepreno, la societo Vianini, kiu ricevis la taskon konstrui la baraĵon, eĉ ne povis eklabori. La Mafia bruligis la labordomojn kaj minacis je murdo la teknikistojn kaj laboristojn. La ŝtato ne reagis per sendo de forta polica armeo. Ĝi rezignis konstrui la baraĵon kaj pro tio devis pagi al la societo Vianini grandan monsumon. Estis skandala venko de la egoismo de kelkaj feodaluloj super mizeruloj. Plian fojon Danilo Dolĉi oferis sian vivon por ĉesigi maljustaĵon. La 7-an de septembro li ekfastis anoncante, ke ĉu la registaro plenumos sian promeson, kaj tiucele uzos eĉ la forton de sia armeo, ĉu li mortos.

Tiu fastado alarmis la publikan opinion kaj la registaron. Okazis kunvenoj de reprezentantoj de plej diversaj organizaĵoj sub la prezido de la ministro Pastore kaj la 14-an de septembro la registaro anoncis, ke la ekkonstruo de la baraĵo okazos tiun ĉi vintron. Ĝi faris promeson al Danilo Dolĉi, kiu povis ĉesigi sian fastadon la 16-an de septembro. Sed li tiam anoncis, ke se la promeso ne efektiviĝos, li refastados ekde februaro 1963.

Ne estas la unua venko de tiu disĉiplo de Gandhi kontraŭ maljustaĵo, ni esperu tamen, ke kontraŭ la potenco de la Mafia li povos instigi la italian registaron al serioza ekago. Ĉar ĉiu venko de la italia registaro kontraŭ tiu sekreta societo signifas solidigon de la demokratio kaj de la justeco en tiu lando, dum venko de la Mafia signifas starigon de nehomeca reĝimo, kaj ni tre bone scias, kien tio kondukas.

Nun venas demando. Kial ni tiom parolas pri la perfortaj revolucioj, kaj plej ofte silentas pri tiuj, kiuj uzas neperforton por kontraŭstari maljustaĵon ? Ŝajnas al mi, ke Danilo Dolĉi, kiu memvole donas sian vivon por defendi subpremitan popolon tiel heroas, kiel revoluciulo, kiu mortigas siajn kontraŭulojn simile al la terura Mafia. Per la armiloj oni ĉion povas defendi :

maljustaĵojn kaj justaĵojn. Sed bedaŭrinde tiu metodo malofte permesas defendi justaĵojn sen kaŭzi murdojn kaj ruinojn kaj eĉ kelkfoje konduki al nova maljustaĵo, kiu simple anstataŭas la malnovan.

Ni aŭdis pri la fastado de Danilo Dolĉi, kiam li ĝin komencis. Sed la gazetaro kaj la radio nin poste ne informis pri la rezulto de tiu ago. Tamen ĝi sukcesis ekvenki grandegan koalicion. Imagu kiom da mortigoj perfortulo estus devinta kaŭzi por alveni al simila rezulto. Sed pri tiu perfortulo la gazetaro estus konstante raportinta, ĉar okazas io : domoj ruiniĝas, infanoj orfiĝas, malamo naskiĝas.

Mi timas, ke tiom longe, kiam daŭros tiu sinteno, ni iros de milito al milito kaj ne povos ekkonstrui pli homecan homaron. Sed dependas de ni, ke tio ŝanĝiĝu. Helpu min en tiu laboro. Sendu al mi informojn pri neperfortaj rezultoj kaj pri perfortaj rezultoj. Ilin ni konigos kaj diskutos.

Vi aŭdis prelegon en esperanto. Parolis Claude Gacond, la prezidanto de Esperanto-Edukistaro de Svislando pri la neperforta revolucio en Sicilio. Ĝis reaŭdo !

-oOo-